

PREZO: 1.50 Kr.

Löfdquist, Tjerp 1951

# MALGRANDA REVUO

Nro 2 • 1951

9a JARO

## ENHAVO:

	Pago
Meditoj, herezoj kaj oponoj, de J. Kohen-Cedek	1
Impresoj el Literaturnaĵa gazeta, de S. Engholm	10
El mia vivo, II, de Roman Sakowicz . . . . .	17
Tri fabeloj de Lessing, trad. de Johan Hammond Roszbach . . . . .	23
Kion ĝis nun Ameriko ne donis, de J. Régulo Pérez . . . . .	24
Literaturo . . . . .	28

*Redaktoro — Eldonanto:*

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

# MALGRANDA REVUO

aperas provizore kvaronjare. Prezo 1,50 kr. (inkl. sendkoston).  
Jarabono 6 kr. Unuopa okz. al eksterlando kontraŭ 5 rpk. —  
S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 268023.

MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas  
ilin aŭ franko por resendo.

## Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo" Neutorgasse 9, Wien I.  
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3,  
Brussel W.  
Brazilo: Sro Jozefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de  
Janeiro.  
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth  
(Herts).  
Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en ĈSR, Uralské Nám. 9,  
Praha.  
Danujo: Libroservo de CDEL, Hörmarksalle 5, Risskov.  
Studenta Esperanta Klubo, Nitvej 7, Kopenhago F.  
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.  
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol,  
Paris X.  
Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7,  
(13 b) München-Pasing.  
Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.  
Israel: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalema.  
Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.  
Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.  
Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sol.  
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.  
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St.  
New York II.  
Sro Arthur S. Kane, 1121 N. Central Ave., Glendale 2,  
California.

# MALGRANDA REVUO

Nro 2

9a JARO

1951

## Meditoj, herezoj kaj oponoj

De J. Kohen-Cedek

Mi ne konsentas eĉ pri unu el ĉiuj vortoj  
diritaj de vi. Sed mi estas preta doni la vivon  
por via rajto diri ilin.

Voltaire.

La Ia Universala Kongreso de Esperanto (1905) akceptis  
la t. n. Deklaron pri esperantismo, kiu proklamis, ke la celo  
de nia movado estas disvastigi la uzadon de la lingvo esperanto.  
Cetere ĝi rimarkigis, ke "ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu  
aŭ alia esperantisto ligas kun la esperantismo, estas lia afero  
pure privata, por kiu la esperantismo ne respondecas". Laŭ  
la lasta deklarpunkto "Esperantisto estas ĉiu persono, kiu  
scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj ajn  
celoj".

Tiuj ĉi punktoj obligis al la aplikintoj de plej diversaj idealoj  
disvastigi per esperanto siajn sociajn, politikajn kaj bonfarajn  
konvinkojn. Tial naskiĝis en la vasta publiko multaj malĝustaj  
kaj eĉ kontraŭdiraj konceptoj pri la esenco de la esperantismo.  
Kelkaj el ili radikigiĝis kaj kaŭzas konfuzojn ĝis nun. Ĉu vi  
ne aŭdis responde al via esperanta konfeso la replikon:

— Ho, sinjoro vi do estas esperantisto! Sed ĉu sole vege-  
tarano aŭ ankaŭ abstinenculo?

Foje mi klarigis al certa angla lordo, cetere multinformita  
persono, kion emblemas mia kvinpinta stelo.

— Esperanto? . . . Ho jes, mi jam aŭdis. Ankaŭ mia sam-  
klubano, vicgrafo M., estas esperantisto. Sed mi ne plu me-  
moras precize, al kiu direkto li apartenas, al . . . hm, . . . spiri-  
tista aŭ al teozofia.

La misopinioj necesigis jam en la fruaj jaroj de nia movado pli precizan klarigon pri nia ideenhavo. Zamenhof faris tion en 1906 dum la malfermo de la IIa Universala en Genève per sia fama parolado pri "la interna ideo" de esperanto. Li diris: ". . . al laborado por Esperanto instigas min ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo . . . estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj . . ."

Ŝajnas, ke tiu formulado, kvankam konciza, estas kontentige klara kaj preciza. Tamen ĝi naskis novajn eraropiniojn. Oni eĉ akuzis Zamenhof pri disvastigo de antipatriotaj ideoj. Kaj en Londono (1907) li devis klarigi: "La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si . . ."

Sed malgraŭ ĉiuj klarigoj la "interna ideo" restis por la vasta publiko "libro kun sep sigeloj". Oni ofte atribuas al ni plej diversajn malproksimajn idealojn. Multaj kredas, ke la esperantismo estas lingva kosmopolitismo, kiu celas krei senaciecan, unuŝtatan mikshomaron. Aliaj supozas nin anarkistoj, kiuj strebas al senŝtata sociordo. Multaj identigas nin kun pacistoj kaj militrozistoj. Verŝajne ni mem kaŭzis multajn el tiuj misatribuoj, per nia ofta deklamo de ŝablonaĵoj pri interpopola amo. Kelkaj ilustraĵoj kuriozaĵoj eble amuzos vin.

Siatempe mi apartenis al la kaŝa rezistmovado, kiu kontraŭ imperialisma fremda jugo batalis pro sendependeco de mia lando. Ĝi estis la sama "Nacia milita organizo" (Irgun Ecel), kiun la gazetaro de la subpremanta nacio abunde stampis per insultvortoj kiel "teroristoj, gangsteroj" ktp; ĉar la rezistmovado batalis ne per neĝobuloj aŭ kartonglavoj sed — à la guerre, comme à la guerre — per la samaj iloj, per kiuj la mondimperio superregis en la sklavigita lando. En 1947, kiam la reciprokaj teroragoj atingis la kulminon, mi partoprenis nian Universalan kongreson. En privata konversacio mi klarigis al diverslandaj kolegoj mian politikan kredon, kaj mi aŭdis jenajn kontraŭdirojn:

— Kial vi insistas pri kreo de nova sendependa ŝtato, dum

jam sen ĝi ekzistas tro multe da ŝtatoj? La mondon oni devas unuigi sed ne dispecigi".

Alia samideano celis eĉ pli profunden:

— Kial vi nepre deziras konservi vian etan dissemitan polon? Asimiligu ĝi ĉie kun la aliaj. La mondo ja devas paŝi antaŭen al nuligo de naciecoj.

Al ambaŭ mi respondis per kontraŭdemando:

— Ĉu ekzemple via nacio estus preta rezigni pri siaj lingvo, moroj, materia kulturo, sociordo, regnoformo, ŝtateco — do pri la tuta enhavo de sia propra nacia vivo, kaj cedi ilin ĉiujn al fremda ekspluata posedoteno — por la bono de probable iam efektivigonta tutmonda homarunuigo?

Tamen unu mildkora samideano miris:

— Kiel vi, esperantisto, povas konsenti uzi batalrimedojn? Ĉu vi ne scias, ke "eltirinta la glavon de glavo pereos"?

Kaj unu tre simpatia piulino konvinkite aldonis:

— Vera esperantisto neniel povas bataluzi armilon. Ĉar estas klare skribite: "Donu al Cezaro la cezaran kaj al Dio la dian!"

Eĉ kiel varmega ŝatanto de novtestamentaj tekstoj mi tamen dubas, ĉu la esperantismo nepre kondiĉigas nereziston kontraŭ malbono. Kaj se jes, laŭ kiu? Ĉu laŭ L. N. Tolstoj, ĉu laŭ mahatma Gandhi, aŭ ĉu la esperantismo postulas de mi nepre esti adepto de rabbi Jeŝuo el Nazareth, "pretendante, ke mi etendu ankaŭ la maldekstran vangon, kiam oni frapas la dekstran?"

Verŝajne ankaŭ sro Rudolf Anders estas adepto de nerezisto kontraŭ malbono. Li almenaŭ predikas absolutan pardonemon al la militkrimuloj, same apogante sin sur evangelia teksto: "Pardonu al ni nian kulpon, kiel ni pardonas al tiuj, kiuj kulpis kontraŭ ni!" (vidu MR 4/1950 p. 7). Temas tie pri germanaj kruelaĵoj al judoj, dum la lasta mondmilito. Sed ĉu la esperantismo devigas min pensi kristane kaj bazi mian etikon sole sur altruista amo? La etiko de mia religia penso baziĝas precipe sur justeco. Laŭ ĝi la pardono devas sekvi post pento de la kulpinto, pento pruvita per plibonigaj faroj. Sed ne, anstataŭe estas necado de faritaj krimoj (samnumere p. 6), kvazaŭ ne estus okazintaj la procesoj en Nürnberg kaj

kvazaŭ ili estus nenion pruvintaj. Sro R. A., petante indulgon, ne faru al si iluziojn! Nur la ripetkrimuloj sopiras al mondordo de kompleta ĉionforgeso. Ne ekzistas pardono sen laŭcbla malbonriparo. Nek judoj nek ĉeĥoj nek poloj nek rusoj nek iuj aliaj ĝisfunde ofenditaj popoloj pardonos al la germanoj iliajn fiagojn, ĝis ili estos rebonigintaj ĉiujn krimojn, resanigintaj ĉiujn vundojn kaj restarigintaj ĉiujn Lidiceojn.

Ankaŭ sro Carlos de Jesus (MR 4/1950 p. 11) estas certa, ke la interna ideo de esperanto konsckvence gvidas al kristana moralkompreno, kaj tial ankaŭ li bazas siajn konkludojn sur biblia teksto. "Esti esperantisto signifas ami la proksimumon kiel sin mem", li diras. Tamen li skribas: "Se mi ne estus esperantiĝinta . . . sendube mi apartenus al tiu amaso, kiu abomenas la germanojn kaj kompatas la judojn. Dank' al esperanto tamen ne estas tiel." Bone, li ne abomenu la krue-lajojn kaj ne kompatu la viktimojn. Sed li ne opiniu, ke la esperantismo devigas nin amkaresi krimulojn. Tion postulas de li sole la kristana moralo.

Sro E. Kuder-Maléffy rajtas opinii, ke "religio kaj etike la deklaro de Jesuo staras sur multe pli alta ŝtupo, eĉ la plej alta imagebla", kaj ke el ĉiuj religioj tiu de Jesuo estas supera, la plej supera el ĉiuj iam donitaj" (samnumere p. 20). Alie li ne estus fidela kristano. Sed permesu al mi havi alian koncepton. Laŭ mi ĉiuj religioj estas la plej bonaj, se ili kontentigas la soifon kaj strebon de siaj adeptoj al idealo de perfekta mondo, tiel ke ĉiu akomodas la idealon laŭ formo kaj enhavo al la spiritkaraktero de sia medio. Verdire ĉiuj gravaj religioj predikas amon. La kristanismo faras tion pli ol aliaj. Kial? Ĉar ĝi estis pli persekutata. Ĉar ĝiaj unuaj disĉiploj estis ĵetataj sur cirkarenojn al sangosoifaj bestoj. Ĉar ĝiaj adeptoj povis nur kaŝe preĝi en la katakomboj, ĉar ili mem konsistis el sklavoj kaj suferintoj. (Mi parolas ne pri la doktrinoj sed pri la instrupredika praktiko.) Sed kiam la sekto fariĝis regnopotenco, tiam la eklezio mem gvidis kaj okazigis militojn en la nomo de la Diŝafido, ekstermis alikredantojn kaj herezulojn per imponaj aŭtodafeoj kaj buĉis homamasojn dum la kruemilitiroj ad majorem Dei gloriam. Sed pordinte la efektivan devigpovon la eklezio nun kontentigas sin

per ampredikado. Redonu al ĝi la ŝtatpotencon kun la arme-forto, kaj ĝi denove militos por konkeri landojn, uzurpi regnojn, koruptakiri tributojn kaj sklavigi animojn. Kaj la sama piulo, kiu antaŭe bigote akklamis hosanon, krios "krucumu!". Sro E. K.-M. konsoliĝu per la rimarkigo, ke ne nur la kristana eklezio iris tian vojon, sed ke ankaŭ aliaj religioj simile praktikis (kvankam ne en tia grado). Kaj kune kun mi li deziru, ke neniu religio fariĝu regnopotenco. Kaj por klara kompreno de la esperantismo estas dezirinde, ke ni ne opiniu nian internan ideon kiel antaŭkoncepton, kiu konsckvence gvidas nin al altruista etiko.

Necesas klare difini la sintenon de la esperantismo al pacismo (al bonvola atento de sro C. Joon, vidu "Potenco kaj perforto", MR 5/1950). Kion ĝi predikas? Pacismo estas ideo senkondiĉe kontraŭa al ĉiucela milito. Tio ebligas al konservativuloj falsanime maski sin per pacistaj devizoj por spiti al liberigaj ribelmilitoj. Al reakciuloj ĝi helpas kontraŭ sociaj kaj civitaj ordoŝanĝaj revolucioj. La pacismo neas eĉ la ĉiukaze pravan landodefendon kontraŭ imperialisma atako. La pacista propagando malfortigas la liberigstreĉojn de dependaj nacioj aŭ de koloniigitaj popoloj por batalakiri memstarecon kaj rompi fremdŝtatan ekspluatjupon. Neante la revolucian agadon de subpremitaj popolamasoj la pacismo helpas al despota uzurpo konservi tiranecon. Tiel ĝi pasive akcelas popolsubigon kaj subtenas imperialismajn konkermilitojn.

La pacistoj rekomendas, ke ĉiuj maljustaĵoj estu solvataj per arbitracio de ia tutmonda tribunalo. Ili estus pravaj, se tia ekzistus. Mia popolo tamen faris tiel: ĝi plendis antaŭ la monda forumo kaj atendis — senrezulte. Poste ĝi prenis la sorton en la proprajn manojn kaj ekribelis. La mondo kaj ĝia forumo estis konvinkitaj pri nia justo, tamen ne kuraĝis efektive helpi nin kontraŭ la deziro de sep najbaraj ŝtatoj kaj unu mondopotenco. Kiam ni venkis, la ĝentila mondo venis por nin gratuli . . . Do, ĉu "atendi sur tero, ĝis kiam sekigis la rivero"? — Dankon pro la konsilo! Prefere "ekparolu la glavo, se silentas la pravo!"

Parenteze, nia liberigimilito indignigis R. A. (MR 4/1950 p. 9.) Ĉu nia nacia agado en la patrujo ne estis la sola provo en la

tuta mondhistorio krei novan ŝtaton ekskluzive per paca koloniigo. Se la mondpotenco tamen ne plenumis libervole la mandatkondiĉojn kaj provokis la najbarojn invadi la landon, ĉu ni devus rezigni pri niaj rajtoj por kontentigi la pacistojn? Kompari nian liberig militon kun la germanaj aspiroj al pli vasta vivospaco, tio estis almenaŭ malbontona. Altrudita ribelo kontraŭ fremda juĝo estas ne krimo sed honoro diktata de homdigno.

Imagu, kiel aspektus nia mondo, se ne estus okazintaj liberig militoj en la lasta jarmilo. Ŝtate kaj spirite verŝajne regus la Sankta roma imperio, bazita sur feŭda sociordo per helpo de la Sankta Inkvizicio.

Vere estas, ke ĉe la prava batalo portas al senkulpaĵoj homoj neesprimeblajn suferojn kaj ne ripareblan perdon de homvivoj. Sed ankoraŭ ne ekzistas alia rimedo por establi juston, kie regas neelteneblaj vivkondiĉoj.

Kion entenas la "interna ideo", kion signifas "interpopola frateco"? Ĉu reciprokan flatlaŭdadon, ĉu rezignan humiligon de subigita nacio sub sia mastra popolo?

Internacia frateco postulas de ni sinceran deziron pri bono kaj prospero al ĉiuj aliaj nacioj. Ni devas ekkoni ilin laŭ ilia vera karaktero kaj same mem konigi nian propran animaspekton. Ekkoni kaj respektplene pritaksi, lerni kaj imiti ĝiajn trajtojn, se ili plaĉas. Se ne, senhipokrite kritiki por eduki la alian nacion.

Ĝuste tion mi faris en MR (2/1950). Malkaŝe kaj sincere mi vipis la germanan kruelecon dum la lasta mondmilito. R. A. neis la respondecon de sia nacio pri la faritaĵoj (4/1950). Al li aliĝis C. de J. (samnumere). Ili ambaŭ akuzis min pri venĝemo. Sed ĉu mi postulis rearanĝi por ili koncentrejojn laŭ Bergen-Belsen, ĉu reinstali por ili gaskelojn? Ĉu kritiko signifas malamon? Ĉu prokurora akuzo antaŭ juĝistaro signifas malamon al la kriminto? Koleron, indignon, ĉe abomenon — jes, profundan animan doloron — milfoje jes! Sed kial akuzi min pri furia fanatikeco?

Nuraj bondeziroj al fremdaj nacioj kaj reciproka kultura

interkonatiĝo ne elĉerpas la enhavon de interpopola frateco. Sentoj sen agoj estas senfruktaj. Unuavice venu zorgoj pri la bonŝtato de alinacianoj, precipe pri la malpli fortaj, zorgoj seriozaj, sen hipokrita falso de imperialismaj potencoj, kiuj sub masko de bonfaro prirabas la "zorgatojn".

Mi rekomendas: Ni ne motivu la aktivan helpon per kristanaj altruistaj argumentoj. La altruismo, taŭga por persona animperfektiĝo, ne estas aplikebla al politikaj interrilatoj. Neniu nacio konsentus "demeti la subveston" por cedi ĝin al nacio, kiu volas forrabi ĝin aŭ "etendi la maldekstran vangon" al tiu, kiu batas la dekstran. Internacian reciprokan helpon ni argumentu per egoistaj, utilecaj konsideroj. En nia mondorganismo kunplektita de komunaj interesoj ne ekzistas sole unuflanka sufero aŭ nure loka malbono. Ĉiuj malsanoj estas infektaj, sociaj same kiel korpaj. La intereso por venki ilin devus esti komuna.

Rasaj valordiferencoj? Oni ne povas gradigi la naciojn kiel multvalorajn kaj senvalorajn. Ĉiuj posedas proprajn animaspektojn, proprajn kapablojn. Se estus eble komparmezuri ilin, oni kredeble trovus, ke ĉiuj same valoras, ĉe la kreforto de la huŝmanoj kompare al tiu de la anglosaksoj. Se la unuaj estus vivintaj sub samaj naturaj kondiĉoj kaj en samaj historiaj cirkonstancoj kiel la lastaj, ili eble estus samvalore pliriĝintaj la homaron — sendube aliforme laŭ ilia povo kaj gusto, sed same utile kaj fruktorige. Granda estas la diferenco inter la nacioj rilate al iliaj kreformoj, sed tio tre pliriĝigas la ĝeneralan kulturtrezoron.

Ekzistas granda kulturdiferenco inter la nacioj laŭ ilia evolugrado, sed tio signifas ne valordiferencon. Eĉ popolo staranta sur malalta evoluŝtupo posedas propraforman latentan kapablon kaj povos foje donaci al la universala kulturtrezorejo sian tributon. Tiu diferenco estas komparebla kun aĝodiferenco inter samfamiliaj gefratoj. La amerikaj negroj, antaŭ tri generacioj kulturmutaj sklavoĵoj, jam disvolvis interesan kulturan agadon sur la kampoj de literaturo, muziko ktp. Tial estas devo de alkulturaj popoloj helpi la neprogresintajn kaj evoluigi iliajn kreopovojn (anstataŭ veneni ilin per alkoholo kaj opio aŭ ekstermi ilin).

Ĉiuj popoloj devenas de same sovaĝa origino, prave rimarkigis sro C. de J. Sed ekzistas malfeliĉosortaj nacioj, kiuj dum jarmiloj stagnis, konservante barbarajn ecojn kaj post nelonge daŭra evoluo regresas al atavisme renaskiĝantaj latentaj prainstinktoj. Tio, kiel diris C. de J., estas pli malfeliĉo ol kulpo. Kaj ne nur kompaton indas tia popolo. Ĝi bezonas ankaŭ reedukon. Tio estis la celo de mia "Israela letero". R. A. malpravas komparante la nuntempajn germanajn krueleaĵojn kun tiuj de israelidoj faritaj dum la konkero de la lando Kanaan per Josuo ben-Nun. La lastaj okazis antaŭ 3 1/2 jarmiloj, dum la naskiĝa periodo de nia popolo, ĉe la komenco de ĝia evoluvojo. Surfingre kalkuli la tiamaĵn teruraĵojn por pruvi, ke la nunaj germanoj ne estas solaj en sia kruelemo, ŝajnas iomete stranga historiozofio! Same malpravas C. de J. atribuante al mi aserton pri supereco de nia popolo. Nature mi fieras pro aparteno al kulturo de 3 1/2 jarmiloj, kiu fariĝis tuthomara posedo, sed mi ne supozas min nobelulo, demokratie preferante noblecon pli ol nobeltitolon. Parolante pri germanaj judoj mi diris: "Ĉar tiuj judoj . . . superantaj la germanan filistraniman naturon". Guste tiuj superis, ne ĉiuj. Mi menciis germansonajn nomojn, ĉar temis pri germanaj judoj. Se temus pri polaj, mi povus nomi Korczak, Tuwim, Hejftetz, Wieniawski, Moszkowski kaj dekon da aliaj.

Mi jam diris, ke ĉiu popolo devas aspiri al feliĉo por si mem kaj aliaj. Tio estus atingebla sen sangaj konfliktoj, se ni kreus justan kaj agokapablan supernacian mondareopagon en formo pli taŭga ol la nuna UNO, kie estus solvataj ĉiuj diskutablaj aferoj ne laŭ principo de ius ŝtatintereso sed sur la bazo de justo. Jam instruis Th. Herzl: "Ne opiniu la mondon rabista bando; la mondo estas juĝtribunalo!"

Estas cinika mensogo ofendanta la homan dignon, ke la feliĉo de unu popolo estas realigebla nur je la kosto de alies feliĉo. Nur provizore, nun kiam la homaro travivas sian antaŭmaturiĝan febron, devas malfeliĉe la ofenditoj eltiri glavon por akiri aŭ defendi siajn vivraĵojn. Kontraŭ tio helpus neniam evangeliaj tekstoj. La krudaj vivbezonoj estas pli fortaj ol la altruista edifado. Sed teorie, sekve iam ankaŭ praktike,

povos sur nia tero kontente vivi multe pli granda homgento. Estas homara tasko realigi la certe eblan eternan pacon.

En la konsideroj pri la egaleco de la nacioj ni notu la lastan rezervadon. Ĉiuj popoloj devas esti samrangaj, sed ne ĉiuj povas ankoraŭ esti jure egalrajtaj. Mi ne konfidus jam nun plenan memstarecon al tute ne progresintaj popoloj. Dio scias, al kiaj aventuroj povus forlogi ilin ies malica tentado. Ilin devus dume prizorgi la unuigita homaro, ne konfidante ilian sorton al iu certa regnopotenco. Tial mi kun granda suspekto observas la projektojn pri "sendependeco" de Libio kaj Sudano. Same rilate al nacioj travivantaj nun socian aŭ spiritan malsanon. La homaro devus ilin kuracizoli kaj dum ilia febra baraktado forte bridi ilin, Germanujon same kiel la tutan Orienteŭropon.

Ni imagu momente, kion dirus iu nuntempa filozofo (ekz. de la tipo de B. Russell), se li vivus en la XIIIa jarcento, pri la detrumaĵo de la hordoj de Ĝingis-Ĥan. Verŝajne jene: "Kvankam ĉiuj nacioj estas egalrajtaj, oni tamen devas bridi la mongolojn, ĉar iliaj detruaj instinktoj indikas psikan infanmalsanon." Ĉu ni devas pensi alie pri la hitlera furiozo? Eble nur pri la simptomoj, kiuj lastokaze atestis pri atrofio de moralbremsaj psikocentroj. Tial nunmomente gardu nin Dio de rearmigo de Germanujo kaj Japanujo! Precipe ĉar miloj da militkrimuloj tie ĝuas plenan liberon en atmosfero ne purigita de faŝista agitado. R. A. proponas konverti ilin. Mi deziras al li pli facilan vivokupon ol konverti la bête humaine

Else Koch! Est modus in rebus.

#### Redakcia rimarkigo.

Iuj samideanoj malaprobis, ke mi ne nro 4/50 finis la diskuton inter Israel kaj Germanujo. Efektive mi intencis skribi ". . . se ne venos artikoloj kun novaj, gravaj vidpunktoj". Pro urĝo kaj neatento tiuj vortoj ne aperis, kion mi bedaŭras. En la supra artikolo sro Kohen-Cedek parte revenas al tiu diskuto sed cetere prezentas aliajn konceptojn. Respondojn aŭ rimarkigojn mi volonte aperigos, tamen insiste petas: skribu koncize. La preskosto estas tre alta, kaj ni devas skribi kaj presi

nur tion, kio nepre meritas presadon. Pensado kaj penado estas postulata por esprimi per 20 linioj tion, pri kio oni povus skribi 100, sed la rezulto valoras la penon kaj oni ne devias de la esenca afero.

En la pasinta diskuto la origina kaj klare limigita demando estis, ĉu ĉiuj unuopaj germanoj estas kollektive kulpaj pro la krimoj faritaj de germanoj dum la lasta milito. Principe tio rilatas al ĉiuj individuoj kaj ĉiuj popoloj: Ĉu ĉiuj unuopaj membroj de ŝtatoj estas kulpaj pri la krimoj faritaj en la nomo de tiu ŝtato? Tiu demando restas netraktita kaj nerespondita, kvankam oni per simpla jes aŭ ne povas esprimi sian koncepton kaj per malmulte da linioj motivi ĝin.

S. E.

## Impresoj el Literaturnaja gazeta

Literaturnaja gazeta (Literatura gazeto) estas organo de la estraro de la unuiĝo de sovetiaj verkistoj. Ĝi aperas trifoje semajne kaj havas ordinaran gazetformaton kun kvar paĝoj. Jen kelkaj rebriloj el ĝi, el la unua kvaronjaro de 1951.

En la fino de januaro la konata aŭtoro Ilja Erenburg fariĝis 60-jara. Estis granda festo por li. En sia respondparolo li diris interalie (L. g. nro 12):

"Ni (la verkistoj) dediĉis nin al la literaturo kun klara konscio, ke tio estas ne distro, ne ludado per vortoj, ne libertempado, sed servado — al la homo, al la popolo, al la ideoj de frateco kaj justo. — — — Lukti kontraŭ tiuj mensogaj principoj, pri kiuj parolas Belinskij (Belinskij estis antaŭe citita), en la nomo de la homa digno — tia estas la devo de verkisto, tia lia misio. Li ne kompilas protokolojn pri okazoj, ne reproduktas, ne kunmetas priskribon de la ekzistado, li malkovras la trezoron de la homa koro. Ĉu ne en tio estas grandaj niaj geniaj antaŭuloj de Puŝkin kaj Lermontov ĝis Ĉeĥov kaj Gorkij? Ĉu ne en tio estas la forto de la plej bonaj libroj de nia sovetia literaturo? Kiel civitanoj en nova mondo ni povas kaj devas altigi tiun homon, kiun oni foje nomas "ordinara" sed kiu vere estas nordinara, same kiel ĉiu homo,

ĉar en la mondo ne ekzistas io pli komplikita kaj io pli valora ol la homa koro. — — —

Mi, same kiel multaj el miaj samtempuloj, ne en unu momento komprenis la sinsekvadon kaj la universalecon de la homa kulturo. Ni ofte legas historion ĉapitre sed ne kunligas la ĉapitrojn, kaj foje la geografio malhelpas al ni rigardi historion, kiel ni devus. Dume pludaŭras la kurado kun la stafeto, kaj la fajro de Prometeus transiras el mano al mano. La stafeton akceptas ne nur generacioj — sed foje ankaŭ popoloj. Kiu dubas pri tio, ke nun ĝuste ni respondas pri la sorto de la homa kulturo, ne nur pri la konservado de ĝiaj valoroj sed ankaŭ pri ĝia plievoluigo, plidisvastigo, pliprofundigo. Ŝajnas, ke ne ekzistis pli malfacila tasko ol tiu sed ankaŭ ne pli grava. La konscio pri tio helpas nin sovetiajn verkistojn en nia malfacila kaj komplikita laboro."

Mi elektis tiujn liniojn kiel reprezentajn por la plej bonaj konceptoj kaj strebadoj, kiuj trovas esprimon en Literaturnaja gazeta, kaj kiuj ankaŭ sendube reprezentas la plej bonajn konceptojn kaj strebadojn de la sovetianoj ĝenerale. Mi aparte mi estas plene konvinkita ke tiuj vortoj kaj tiu pensmaniero estas tute sinceraj. Se oni tiel rigardas ilin, ili ne bezonas komenton.

Rilate al tiu punkto en la lasta parto de la citaĵo, kiu diras, ke Sovetio portas la respondecon pri la sorto de la homa kulturo, ni aliaj preferas diri, ke tiun respondecon portas ĉiuj popoloj, aŭ pli bone: ĉiuj homoj sendepende de iliaj nacioj. Per tio ni neniel kaj neniom malgrandigas la grandan signifon, kiun havis kaj havos la kulturo de Rusujo kaj Sovetio.

Pri la stilo kaj enhavo de la artikoloj en Literaturnaja gazeta oni ne povas ĝenerale juĝi laŭ tiu citaĵo. En tre multaj artikoloj estas abundo — tamen ne riĉeco — da vortoj kun minimumo da enhavo. Tiun lingvon parte karakterizas rimarkigo de Erenburg en alia artikolo (La verkisto kaj la vivo, nro 30): "Kiam mi legis la manuskriptojn de kelkaj junaj verkistoj, surprizis min la malriĉeco de ilia vortprovizo. Multaj el ili skribas ne en la rusa sed en speciala, malbela gazeta lingvo. En ĝi estas malmulte da vortoj, ĝi estas seka kaj senpova kiel esperanto. Per ĝi estas eble esprimi tre simplan

ĉiutagan penson, sed estas ne eble per ĝi verki "La heroo de nia tempo" aŭ mallongan ĉeĥovan rakonton. La malriĉecon de la vortprovizo kelkaj junaj verkistoj provas plibonigi per ofta uzo de grandaj vortoj, superlativoj, hiperboloj. Foje tio memorigas pri foiraj atletoj, kiuj levas kartonajn pesilojn kun la surskribo '100 kg'. Perdiĝas la sento por la vortvaloro. Mi demandis komencantan literaturiston: 'Kio ŝajnas al vi pli forta, la esprimo mi amas vin, aŭ, mi tre amas vin?' Sen pripensi li respondis: 'Kompreneble: tre amas.'

Ke individueco kaj memstara spirita vivo ne estas malaprobataj en Sovetio montru kelkaj pluaj citaĵoj. Ili estas ĉerpitaj el la artikolo "Pri la 'sekreto' de poezio" de M. Isakovskij (nro 29).

"Mi pensas, ke estas ĝuste diri jene: 'la sekreton' de poezia kreado la poeto povas trovi nur mem kaj en si mem. Ĉiu poeto devas 'malkovri' ĝin por si denove.

Posedo la poezian 'sekreton' — tio antaŭ ĉio signifas memstarecon en la kreado, t.e. paroli tiel kiel nur vi povas paroli al iu alia pri tio, pri kio povas paroli nur vi.

En poemoj neeviteble aperas ne nur la poezia faka kapablo de poeto — — — sed samtempe aperas ankaŭ la karaktero de la poeto mem, lia personeco, liaj individuaj homaj kvalitoj. — Lernante la juna poeto devas antaŭ ĉio kreski, kiel homo, kiel homa personeco. — Aliaj povas vin helpi, povas tion aŭ tion sugesti, konsili, sed la fundamentan kaj ĉefan vi tamen devas mem fari."

En Literaturnaja gazeta troviĝas multe da artikoloj, kiuj tre malmulte aŭ tute ne havas rektan rilaton al literaturo sed temas pri politiko kaj diversaj sociaj aferoj.

En la numero de la 1a de februaro troviĝas artikolo pri la politiko en Finnlando. En ĝi troviĝas preterpase jena konstato: "En la romano Sep fratoj la finna klasikulo Aleksis Kivi desegnis portretojn de sep kamparanoj-akiremuloj atakitaj de aspiro al la altoj de la socio. Ili senĝene ignoras la interesojn de siaj samvilaĝanoj por kontentigi la emon al posedopotenco."

Vole nevole oni demandas sin, ĉu la sovetiaj informoj pri

grava eksterlanda literaturo ordinare estas same strangaj kiel tiu ĉi.

Post la aserto pri la sep fratoj la aŭtoro tuj transiras al sepo da dekstraj "socialperfiduloj" en la nova registaro, kiuj siamaniere sekvas la ekzemplon de la sep fratoj.

Mi absolute nenion scias pri tiu nova registaro kaj la sep socialperfiduloj, sed la libron Sep fratoj mi bone konas, kaj post tia kurioza aserto pri ĝi mi vole nevole devas demandi min, ĉu la dua aserto estas pli vera ol la unua.

En nro 30 troviĝas artikolo, kies aŭtoro apartenis al delegacio, kiu vizitis Finnlandon kaj ankaŭ iom ĉirkaŭveturis tie. Li mencias interalie, ke "kiel rezulto de senkaŝa promo de la alia flanko de la oceano en la finna registaro denove aperis malicaj malamikoj de la popolo — dekstraj socialdemokratoj".

Dum la vojaĝo en la lando li "plurfoje observis faktojn de impertinenta amerika propagando kaj persistajn provojn de amerikana enpenetro en la vivon de Finnlando. Antaŭ ĉio: ĉie impertinente frapis la okulojn la reklamoj de la filmkuirado en Hollywood; sur tiuj afiŝoj homoj kun larĝaj ŝultroj, mallarĝaj talioj kaj malgrandaj fruntoj nepre pafas sur iun kaj iun mortigas. En la montrofenestroj de la librovendejoj ni vidis kontraŭsovetiajn kalumniajn librojn de la amerika agento kaj militkrimulo Tanner, en kiuj estas glorigata la transoceana 'vivmaniero'. La bretoj de la librovendejoj estas plenaj de militpropagandaj verkoj, alportitaj el Usono kaj Britujo. Tie oni povas ĉion trovi — de la 'biografio' de la hitlera heroaĉo Rommel ĝis la militinstigaj 'memoroj' de la hommanganto Churchill. La finna radioinformado estas ludonita al ĉiaspecaj 'predikantoj' kaj 'inspektantoj' importitaj de trans la oceano. Samtempe aliro al la mikrofono estis al la pacanoj (estis pacpropaganda delegacio) esence (praktiĉeski) malpermesita. En la kadro de 'kultura interŝanĝo' oni grupe transportas finnajn studentojn al Usono, kie oni laŭcele 'prilaboras' ilin."

En Tampere li tuj kunpuŝiĝis kun "tri amerikaj 'misiistoj', kiujn oni facile povis rekoni kiel alivestitajn oficirojn. Unu el ili, oni devas supozi ke ne hazarde, ekloĝis apud ni en 'Granda hotelo'. Dum la tagoj en Tampere ni plurfoje renkontis



amerikajn 'misiistojn', kiuj laŭvorte inundis Finnlandon en la lasta tempo. Estis en iliaj vizaĝoj io komuna kun la aspekto de la kinoherooj, kiuj seninterrompe pafas de la amerikaj filmafiŝoj."

Tiuj citaĵoj reprezentas alian flankon de la enhavo de Literaturnaja gazeta. Tia prezentmaniero estas ĝenerala, kiam temas pri nekomunismaj landoj kaj homoj.

Tia prezentmaniero kun multe da insultvortoj kaj sentoinstigaj sugestoj ŝajnas al racie kaj memstare pensanta homo ne evidente fidinda. Se oni serĉas kaj volas prezenti nur la veron, taŭgas nur la vortoj kaj esprimoj, kiuj rekte redonas la realon, ne pli kaj ne malpli. Leganto rajtas demandi, ĉu la aŭtoro kontentige regas la finnan lingvon kaj intime konas la finnojn kaj la cirkonstancojn en Finnlando aŭ ĉu li nur rerakontas tion, kion rakontis al li finnaj komunistoj.

Por alilandanoj mi aldonas informeton pri unu punkto. En Helsinko troviĝas la plej bone ekipita librovendejo en la tuta Nordo. Tio siavice indikas la spiritan nivelon de la finnlanda popolo. Ĉu estas malbone, ke multe da diversaj libroj estas akireblaj? Ĉu estas malbone, ke la homoj povas mem legi diversajn librojn kaj tiel mem formi siajn konceptojn? Eĉ se Churchill estus tia monstro, kia opinias lin la aŭtoro, li tamen estas unu el la plej grandaj aŭtoroj de nia tempo. Lia stilo kaj verkarto meritas studon de ĉiu homo kun intereso por tiaj aferoj.

La aŭtoro ŝajne trovas tion lute memkomprenebla, ke li prijuĝas kaj kritikis alian popolon laŭ siaj vidpunktoj, kaj ke estas granda manko kaj eĉ io krimema ĉe ĝi, se ĉio ne estas laŭ lia koncepto. Uzi tian manieron por voki aliajn popolojn al komuna laboro por paco apenaŭ vekas kunlaboremmon krom ĉe komunistoj de la sovetia ideologio.

Jen du aspektoj de la enhavo de Literaturnaja gazeta, kiuj siavice certe respegulas la menson de la rusa popolo. Kiel mi diris, mi estas plene konvinkita pri la sincero de la unua. Mi estas same konvinkita pri la sincero de la dua. Por okcidentano kun toleremo kaj respekto al aliaj homoj kaj iliaj

vidpunktoj la kuneco de tiuj du aspektoj ŝajnas stranga, eĉ nekomprenebla.

Mi trovas nur unu klarigon: ke la sovetianoj tiel forte kredas, ke ilia ideologio estas la sola kaj universala vero pri la homa kunvivado, ke ili pro tio estas firme konvinkitaj, ke ĉio, kio ne konformas al tiu ideologio, estas malbona kaj kondamninda, kaj ke ĉiuj, kiuj ne emas akcepti la ideologion, estas malamikoj de la sovetianoj kaj ĉiam kaj ĉiel provas kontraŭlabori kaj pereigi ilin. Tiuj konceptoj naskas suspekton pri la cetera mondo. La suspekton kaj siajn konceptojn ili ĉiuhore kaj ĉiutage konigas al la tuta mondo, kune kun entuziasma pledo por paco kaj homeco. Ne estas strange, se tio konfuzas la homojn en aliaj landoj.

La pacpropagando apenaŭ estas direktata al la gvidantoj, eĉ ne al la plimulto de homoj en la nekomunismaj landoj. Estas sence inviti homon al paca kunvivo kaj kunlaboro kaj samtempe nomi lin krimulo, perfidulo, murdisto, hommanganto. Ĉu la invito al paco kaj kunlaboro do estas direktita al komunistoj fidelaj al Sovetio kaj al iliaj simpatiantoj kaj la insultvortoj kaj kondamnoj al la ceteraj? Tio signifus, ke paco kaj kunlaboro povus estiĝi, nur kiam la aliaj landoj estus regataj laŭ la konceptoj kaj deziroj de Sovetio. Mia rezonado ŝajnas al mi logika. Tamen la konkludo ŝajnas al mi stranga, se mi komparas ĝin kun la konceptoj, kiujn reprezentas la citaĵoj de Ĥrenburg kaj Isakovskij.

Unu afero estas certa: por paco kaj kunlaboro estas necesa interkompreniĝo, por interkompreniĝo estas necesa interkonatiĝo. Certa estas ankaŭ tio, ke okcidentanoj kaj sovetianoj tro malmulte konas kaj komprenas unu la alian, kaj tiu manko ne estas forigebla per interparoloj de diplomatoj.

Per la lastaj el la supraĵoj mi konsideris la artikolon finita. Tuj poste venis tamen kelkaj novaj numeroj de Literaturnaja gazeta kun ankoraŭ du artikoloj pri la vizito en Finnlando. Tial mi aldonos kelkajn vortojn. La aŭtoro estis en Finnlando dum la granda pasintjara striko, kaj tiam proksimiĝis la komunumaj elektoj. Li vidis multe da agitafiŝoj.

"Sur la afiŝo de Demokratia unuiĝo de la finnlanda popolo (la komunismema partio — red.) estis bildo de laboristo fleksita sub la impostoŝarĝo. La laboristoj pagas 70 procentojn el la tuta impostsumo kaj la burĝaro — nur 30 procentojn. La impostoj en Finnlando estas inter la plej altaj en la mondo. La imposto pro enspezoj ekzemple altiĝis tri-kvaroble kompare kun la nivelo de 1938."

Tiuj linioj verŝajne celas montri, en kia mizero la lando kaj popolo troviĝas pro la influo de kapitalistoj, socialdemokratoj kaj aliaj malamikoj de la popolo. Sed al mi, kaj mi supozas al multaj, tia prezento faras alian impreson.

La statistiko montris antaŭ nemultaj jaroj, kaj certe la stato ne rimarkinde ŝanĝiĝis de tiam, ke Finnlando estas inter la unuaj landoj en la mondo rilate al kiel eble plej egala dividado de la landa posedaĵo sur ĉiuj landanoj, ke la posedantoj de pli grandaj kapitaloj estas malmultaj kaj neriĉaj kompare kun tiuj en aliaj landoj. La kooperativa agado estas kompare al la privata proporcie pli granda ol en la pli multaj aliaj landoj (momente mi ne povas kontroli, ĉu ev. pli granda ol en iu alia lando). Ankaŭ tio signifas malpli multe da "burĝoj". Tiokaze la granda amaso de la popolo ja devas pagi la pli grandan parton de la impostoj. En Sovetio, kie tute ne troviĝas burĝoj, la laboristoj pagas ja la tutan imposton.

Rilate al la altiĝo de la impostoj post 1938, tio evidente malpli dependas de kapitalistoj, socialdemokratoj kaj fuŝa administrado ol de tio, ke tuj post tiu tempo la lando estis militatakata kaj devis porti la elspezojn kaj perdojn, kiujn severa milito alportas. La venkinto postulis la plej riĉan provincon de la lando. La tuta loĝantaro de tiu provinco forlasis sian malnovan hejmon senhava kiel almozulo, kaj Finnlando devis zorgi pri la rifuĝintoj. La venkinto postulis militkompenson, kiu kun konsidero al la nacia posedaĵo de Finnlando kaj la loĝantonombro estis pli alta ol tiu, kiun Germanujo devis pagi post la unua mondmilito. Al ni alilandanoj la tasko ŝajnis neplenmebla. La finnoj tamen akurate plenumis la militkompensojn kaj akurate pagis ankaŭ aliajn ŝuldojn. Dume ili kreis same multe da novaj kampoj, kiom ili perdis per la fordonado de Karelio. La aŭtoro plendas pro manko de loĝejoj.

Ĉiuj informantoj diris, ke tio dependas de tro altaj prezoj de konstrumaterialoj, kio ja indikas sekvon de kapitalisma ekonomio. Ne estas strange, se la prezoj de konstrumaterialoj altiĝis en la lando, se oni devis tiom da materialo doni kiel militkompenson kaj cetere kiel eble plej multe eksporti al aliaj landoj por ricevi iom da mono. Krome la finnoj devis ne nur restarigi detruitajn domojn kaj urbojn sed ankaŭ starigi novajn loĝejoj por la loĝantaro de la perdita provinco.

Tia maniero trakti ekonomiajn kaj politikajn realaĵojn per kelkaj vortoj pri kapitalismo, socialdemokratoj kaj usona influo ne vekas fidon.

En siaj multaj aliaj rimarkigoj li esprimas sin en tono de inspektisto, kiu laŭ devo kaj ĉmo kondamnas ĉion, kion li ne trovas bona. La homoj, kiuj simpatias kun la sovetiaj ideoj estas mirindaj, kaj ilia agado estas bonega. Ĉiuj aliaj estas pli malpli friponoj, kaj ĉiu alia agado estas friponaĵo.

Legante tian sovetian prezenton de alia lando kaj popolo — kaj popolo, kiu dum sia tuta historio montris, ke ĝi povas kiom ajn penadi kaj vivi en malsato kaj mizero por esti honesta kaj povi vivi sendepende — oni ne povas ne demandi sin, ĉu ĝi signifas postulon, ke ĉiuj popoloj vivu laŭ la sovetia maniero, aŭ ĉu ĝi estas kruda malĝentilo, kiun la malĝentilulo mem ne komprenas. Tria obleco apenaŭ ekzistas.

Stellan Engholm.

## El mia vivo

*De Roman Sakowicz*

### II

Kiel malgranda estas nia terglobo por esperantisto!

Dum la verkado de la unua ĉapitro mi eksciis, ke malproksime de mi, en Usono, ĝis nun vivas unu el la unuaj "Esperanoj", sro Postnikov, kiu estis ĉe prezidanto (verŝajne tre juna) de la societo "Espero" en la jaro 1899.

Eble estis li, kiu eltrancis el la gazetoj kaj gluis en albumon artikolojn pri esperanto, aperintajn en la tiutempa rusa ga-

zetaro. Mi vidis tiun albumon en la arkivo de la societo "Espero", kaj mi memoras, ke la artikoloj estis verkitaĵoj plejparte en mokema tono. Ni ne miru, ĉar en la fino de la pasinta jarcento oni en Rusujo povis senpune skribi nur pri "kornohavaj" edzoj kaj — ĉiama temo de ĉiulandaj humoristoj — pri bopatrinoj.

Oni facile komprenas, kia "orminejo" estis por tiaj humoristoj la nova artefarita lingvo.

Mi ankoraŭ memoras la artikolon de la ĵurnalo "Ĉikado", kiu priskribis imagan viziton de humoristo en la societo "Espero". Ĝi estis verkita kun granda fantazio. Tiam rivalis ankoraŭ Volapük kun esperanto. La humoristo uzis ie kaptitajn volapükajn vortojn, komparis ilin kun esperanto kaj moke aldonis: "En esperanto tiuj vortoj sonas — vi sentas la aromon de violo? — la tero estas granda". Forlasante la societatan kunvenon, li diris al la prezidanto (eble sro Postnikov?):

— Mi ne parolas vian lingvon kaj laŭstatute ĉiuj devas en la societo paroli nur esperanton.

— Vi povas esti trankvila, respondis la prezidanto, tiu paragrafo tuŝas ne nian serviston!

Sed post la apero de "Ruslanda Esperantisto" la mokema tono de la gazetaro iom post iom ŝanĝiĝis. La rusa popolo estis tre lingvokapabla kaj volonte lernis lingvojn. Dekjara knabo en ruza gimnazio lernis krom la rusa latinan, grekan, germanan, francan kaj eĉ malnovslavan lingvojn!

Mi ĝis nun povas facile memori belan poemon el la XIIa jarcento verkitan en tiu kasta lingvo, la faman "La vorto pri la regimento de Igor", tiu sama princo, kies nomo en la nuna jarcento famiĝis per la opero de Borodin.

Ĝis nun mi povas citi parkere ankaŭ la ĉarman poeziaĵon de Horatius "Ad Leuconoc", en kiu la poeto konsilas al bela virino:

Dum loquimur fugerit invida aetas  
carpe diem quam minimum credula postero.

(Dum ni parolas kuras envia tempo, do ni kaptu la hodiaŭan tagon kaj ne tro fidu la estontecon.) Konsilo aktuala eĉ hodiaŭ.

Nur en la antikva greka lingvo mi malbone sukcesis (mi

esperas, ke la kara prezidanto de la Helena Esperantista Asocio, dro Stamatiadis, pardonos mian pekon!), sed ĉu oni en la aĝo de dekdu jaroj povas sen enuo legi la senfinajn marŝojn de Anabasis? Mia instruisto en la greka lingvo, sro Kemmerling, estis germandevena pedanto, kiu tri aŭ kvar fojojn en ĉiu semajno turmentis nin kaj vekis malamon kontraŭ la antikva greka lingvo. Mi havis la apartan feliĉon esti vokata de li ĝuste en tiuj tagoj, kiam mi plej malbone konis la lecionon.

La instruisto sidas sur la podio kaj rigardas tra siaj okulvitroj la tutan klason, serĉante la viktimon. Fine li diras:

— Nun legos al ni belajn paĝojn de Ksenofono kaj tradukos ilin . . . (liaj okuloj vagas inter la kapoj de la lernantoj kaj fine, ho ve, fiksiĝas sur mi) . . . lernanto Sakoviĉ.

Ŝvitante mi ekstaras. El la kapo forflugas eĉ la restaĵo de mia scio de la greka lingvo, kaj balbutante mi komencas legi enuajn raportojn pri parasangoj marŝitaj de la greka armeo. La haltoj fariĝas pli kaj pli oftaj, vane mi atendas suflorojn, neniu riskas helpi min. Preskaŭ plorante mi pardonpetas: "Sinjoro instruisto, hieraŭ mi estis malsana, mi havis kapdoloron kaj mia patrino . . ."

— Ankaŭ estis malsana, finas la instruisto, kaj mi vidas, ke li notas en la klasĵurnalo la malagrablan ciferon 2.

Malgraŭ la multo de lernataj lingvoj esperanto baldaŭ akiris multajn adeptojn en la rusa junularo. Multe helpis la favora opinio pri ĝi de la rusa verkisto Leo Tolstoj, kiu post ricevo de zamenhofa lernolibro konfirmis, ke li tra legis ĝin kaj povis ĉion kompreni, kaj konsilis al ĉiu fari la saman provon. El la multaj tolstojanoj mi konis la sufiĉe konatan fraŭlino Ŝarapov, kiu estis arda esperantistino. En la memorlibro pri Tolstoj, aperinta post lia morto, iu aŭtoro plendas pro tiu senĉesa kaj enuiga propagando de fraŭlino Ŝarapov kaj iom kritikis ŝin mem. Mi komprenis la sentojn de la aŭtoro, ĉar la fraŭlino (ŝi estis jam ĉirkaŭ 50-jara) — malgranda, tre vigla kaj multbabilema virineto povis facile teruri eĉ esperantiston. Ni panike timis ŝian elokventon. Mi memoras jenan scenon:

Post universitata lekcio mi iras kune kun samideano Lojko. Subite li kaptas mian brakon, flustras en mian oreilon: "Fraŭ-

lino Ŝarapov!" — kaj ni komencas kuri kun rapido de olimpiaj kuristoj, ĝis la malgranda figuro de la timiga virineto malaperas de niaj okuloj.

Inter la tiutempaj rusaj esperantistoj troviĝis sufiĉe interesaj tipoj. Unu el ili loĝis en Kiev. Bela urbo, pri kiu Puŝkin kantis en sia "Huzaro":

"Jen urbo Kiev! Lando kia! En buŝon falas mem buletoj, kaj vinon havas domo ĉia, kaj kiaj tie virinetoj!"

Kiam mi konatiĝis kun tiu samideano li estis la aŭtoro de la belaj poeziaĵoj "Petaloj". Por doni ekzemplon pri lia poezio mi citas unu:

Tiom da etaj doloroj! Kaj ĉiu al koro rapidas!  
Tiom malgrandaj, ke, vere, pri ili ne indas paroli.  
Tamen ĉi tiuj vundetoj lacigas min kaj malpermesas,  
ke mi akceptu kuraĝe pli grandan, pli noblan doloron!

En tiu tempo li estis junulo, kiu pro malsano ne povis bone movi sin, kaj mi multe bedaŭris, ke la aŭtoro de tiel belaj versoj estas senespera duoninvalido. Post la apero de "Petaloj" mi nenion aŭdis pri li ĝis kelkajn jarojn antaŭ la dua mondmilito, kiam mi okaze legis hitleristan semajnaĵon, eldonatan en Varsovio. Kiel redaktoro de tiu aĉaĵo estis menciata, bedaŭrinde, la aŭtoro de "Petaloj". Li estis forĝisinta sian poemaron, plenan de belaj kaj homaj sentoj, kaj predikis malamon. Tiu malsana homo, kiu jam de junaj jaroj estis forĝita al la lito, vivas ĝis nun.

Kiam mi menciis "Huzaro", mi ekmemoris pri ĝia tradukinto V. Devjatnin, konata en nia movado.

Li estis polica oficiro ie en la regiono de Vilno, kiam li konatiĝis kun esperanto kaj tuj fariĝis arda esperantisto. Li forlasis sian sufiĉe nutrodonan pozicion kaj dediĉis sin al la propagando de nia lingvo. En la komenco de la nuna jarcento, kiam nia movado estis ne tro forta, tio estis riska paŝo. En Rusujo li ne povis trovi kontentigan apogon kaj transloĝis en Germanujon, kie li fariĝis oficisto en iu komerca entrepreno. Li celis havigi iun bienon por starigi "Esperanto-Urbon". Poste li rakontis al mi, ke la afero finiĝis ne tre bone, kaj li devis

vojaĝi al Parizo, kie li ankaŭ ne trovis kontentigajn vivrimedojn. Fine li revenis hejmen, tre originale. Kunc kun iu turka samideano li marŝis piede de Parizo al la jubilea krakova kongreso 1912 kaj propagandis laŭ la vojo. Mi renkontis ilin ambaŭ en Krakovo. Dum la kongreso mi ĉeestis unuafoje en mia vivo socialistan kunvenon (en Rusujo la socialistoj estis severe persekutataj) kunvokitan de socialistoj-esperantistoj. Kies paroladoj estis tradukataj en la polan. Inter la oratoroj estis ankaŭ sro Devjatnin, kaj mi havis la okazon aŭdi ardan socialistan paroladon de eksoficiro de la cara polico.

Devjatnin presigis multajn poeziaĵojn, plejparte tradukojn. Se estas vera la latina proverbo *poetae nascuntur*, oratores fiunt, oni devas konstati, ke Devjatnin naskiĝis ne poeto, sed li facile uzis rimojn. Dum la unua tutruslanda kongreso en 1910, mi invitis lin kaj kelkajn samideanojn al mi por tagmanĝo. Post ĝi Devjatnin skribis longan rimitan epistolon dediĉitan al la abunda menuo. Interalie li uzis kiel rimon la vorton "vjando". Kiam mi turnis lian atenton al la neatendita litero *j* en la vorto, li respondis, ke ĝi estas tute korekta — eble pro tio, ke li uzis ĝin ankaŭ en sia familia nomo.

Dum la krakova kongreso mi tute neatendite renkontis ankaŭ profesoron de la peterburga universitato, la konatan lingviston J. Baudouin de Courtenay. Lian nomon la esperantistoj bone konas ne nur pro lia partopreno en la fama Delegacio, kiu alprenis Idon, sed ankaŭ pro lia sendependa sinteno en tiu Delegacio kaj poste en speciale elektita komisiono, inter kies membroj li estis la sola, kiu ne estis makulita de propra projekto de lingvo internacia.

Laŭ iu praktika homo, oni devas ĉiam esti paralela al la cirkonstancoj. Profesoro Baudouin estis plej ofte perpendikulara.

Li tute sincere kaj malkaŝe diris, ke la Delegacio, "kiu sin mem elektis", prezentas nenian aŭtoritaton, kaj ke la demando de eventualaj ŝanĝoj devas esti decidata de la esperantistoj mem.

Eble pro tiu perpendikulareco li estis forigata el la krakova universitato kaj transiris al la peterburga. Sed ankaŭ en la ĉefurbo de la caro li estis persekutata de la naciistoj, kiuj

interalie ne povis pardoni, ke li, polo, estas "revolucia" redaktoro de Fundamenta Rusa Vortaro. Mi legis mem en la influa naciista *Novoje Vremja* tiaspecan artikolon, kies aŭtoro asertis, ke Baudouin "malpurigas la rusan lingvon". Sed liaj verkoj estas agnoskataj ĝis nun. Antaŭ kelkaj tagoj la moskva Literaturnaja Gazeta en granda artikolo pri la rusa lingvo substrekis, ke la "konata lingvisto kaj gramatikisto prof. Baudouin de Courtenay protestis kontraŭ senkolorigado kaj 'senvizaĝigo' de la vivanta rusa lingvo".

En la peterburga universitato prof Baudouin instruis komparan lingvosciencan. Verdire ĝi estis sufiĉe enua scienco, kaj la profesoro ne ĉiam havis aŭdantaron. En tiaj okazoj savis la situacion filino de la profesoro, ankaŭ studentino en la universitato, kune kun iu el siaj kolegoj ĉeestante la lekcion. En eksterordinara okazo, kiam neniu povis ĉeesti, estis delegata iu samideano de la studenta esperantogrupo, kaj oni rakontis, ke malgraŭ la unupersona ĉeesto la profesoro ĉiam komencis sian lekcion per solena pluralo: "Estimataj sinjoroj!" Profesoro Baudouin estis ofta kaj ŝatata gasto en nia studenta esperantogrupo kaj post la fino de la kunsido volonte kantis kune kun ni la malnovan studentan kanton: "Ĝoju, ĝoju ni kolegoj, dum ni junaj estas!"

Post la rusa revolucio profesoro Baudouin revenis en Polujon, sed ankaŭ de la polaj naciistoj li estis ne ŝatata.

Post la mortigo de la unua prezidanto de la respubliko, li estis kandidato por la posteno de prezidanto, sed li ne estis elektata, certe pro sia "perpendikulareco".

En Varsovio oni rakontis epizodon, kiu estis karakteriza por li:

Iu maljuna, malriĉa judo provis ĉe tramhaltejo eniri en vagonon. Tiu, kiu staris sur la platformo de la vagono, malhelpis kaj forpuŝis lin. Tiam venis Baudouin, kaj li provis helpi la judon eniri. La atakantoj, precipe virinoj, komencis kraĉi sur la profesoron, kiu staris malsupre de ili. Sed li malfermis sian kunportatan ombrelon, protektis sin per ĝi antaŭ la furiozaj virinoj kaj persistis helpi la malfeliĉan judon.

Kvankam profesoro Baudouin ne estis aktiva esperantisto kaj ne apartenis oficiale al nia agado, li kun simpatio observis

la movadon kaj kiel granda humanisto komprenis kaj aprobis la zamenhofan "internan ideon".

La esperantistoj ne povas forgesi tiun noblan homon.

### Tri prozaj fabloj de Lessing redonitaj en trokeoj de Johan Hammond Rosbach Turistoj

(La vulpo kaj la cikonio)

Ruza vulpo iam vidis apud marĉo cikonion. Salutinte li demandis: "Vi ja vidis multajn landojn — ĉu bonvolus vi rakonti el la fremdaj landoj ion?" La turista birdo, kiu ŝatis tiajn ĉi demandojn, komplezeme bekridetis kaj komencis diri nomojn de lagetoj kaj de marĉoj, kie estas ranoj grasaj, kaj de malseketaj kampoj, kie la loĝantoj domojn ne konstruis: — tie estas vermoj ja unuaklasaj!

Nu, sinjoro, vi restadis en Parizo dum monato! Kie en Parizo estas la manĝaĵoj pleje frandaj? Kiu vino en Francujo estas plej laŭ via ŝato? Kaj ĉu francaj vinboteloj estas grandaj aŭ malgrandaj?

### La azeno kaj la ĉasĉevalo

Arogante, malmodeste vete kuris la azeno kun fiera ĉasĉevalo — kaj perdinte sian veton la azeno priridata diris: "Vere, la alveno al la celo bagatele malfruiĝis momenteton. Sed la vera kaŭzo estas, ke mi antaŭ unu jaro malfeliĉe en piedon tretis dolorigan dornon."

"Ho, pardonu!" diras pastro — kaj jen la paroŝanaro atenteme ekaŭskultas lian lertan lingvotornon — "ho, pardonu, ke hodiaŭ nesufiĉe la prediko povis jen cdfi, jen inspiri senton virtan, pian! Sed al vi certigas mi, ke tio estas la efiko de la malvarmumo, kiu ja raŭkigis voĉon mian."

### La leono kaj la leporo

La leono komplezeme konatiĝis kun leporo. "Ĉu", demandis la leporo, "efektive vi leonoj pro krianta aĉa koko forkuregas en angoro?" "Jes", respondis la leono, "nin timigas kokaj sonoj. Kaj cetero — ĝenerale ĉiuj grandaj animaloj havas certan tian etan malfortaĵon. Vi ja scias, tre verŝajne, ke grandegaj elefantoj el ĝangalo timotreme forkuregas, kiam porko grunte krias." "Ho, ĉu vere?" mirigite interrompis la leporo, "ho, ĉu vere! Nun mi ankaŭ efektive ja komprenas, kial ĉiam forta timo estas en lepore koro, kiam aĉaj bojegantaj hundoj tro proksimen venas!"

### Kion ĝis nun Ameriko ne donis

*"... fantazio grandaj sumoj iras de mano en manon. Pro tio, la eblico riĉiĝi en kelkaj jaroj igas la homojn labori ĝis 14 horojn tage; post tiu laboro ili estas korpe kaj spirite elĉerpitaj, sen emo okupiĝi pri idealismaj movadoj."*

Antaŭ ne longe mi legis en la n-roj 15—16 (februaro-marto 1950) de la argentina esperantista gazeto "Eco" la supraĵajn vortojn, en artikolo de s-ano Tibor Sekelj, titolita *Esperanto en Venezuelo*. Tiuj asertoj pensigis min pri tio, kio estas kaj kiel estiĝas idealismaj, spiritaĵaj movadoj.

Tiu pensirado igis min konstati, ke jen foje tiuj movadoj elvolviĝas kvazaŭ miraklo. Ĉar kial la antikva Helenujo naskis kulturon, kiu ĝis nun estas substancujo de ĉiuj postaj fruktiĝoj en la regno de la spirito? Sajne tion ne kaŭzis nur la homoj, ĉar el sama praujo migradis iliaj fratoj, kiuj en aliaj lokoj forgesiĝis sen aŭ kun apenaŭaj kulturaj spuroj; nek nur la medio, ĉar poste tie loĝis turkoj kaj aliaj popoloj, kaj la miraklo ne ripeliĝis. — Ĉu eble la raso? Jen samaj homoj, el sama praujo, nun loĝas en Suomio kaj Karelio; kaj dum Suomio aspektas kvazaŭ nuna Helenujo, Karelio neniel

distingiĝas el inter la ceteraj malpli progresintaj popoloj de Sovetio.

Nu, kion pri Ameriko? Giovanni Papini antaŭ pli ol tri jaroj faris kulturan enketon pri Latinameriko, kaj lia bilanco montris impresan malplenan. Jen hodiaŭ mi volas konigi al esperantistoj iom el tiuj trovoj de malpleno. Sed antaŭ ol daŭrigi necesas montri, ke temas nur pri enketo koncerne la parton de tiu kontinento, kiu etendiĝas de la nordaj limoj de Meksiko ĝis la sudpinta Patagonio, inkluzive Antilojn. Usono kaj Kanado posedas malsaman historian elvolviĝon; tial ili restu hodiaŭ ekster konsidero. — Necesas ankaŭ insisti, ke temas nur pri la sferoj intelekta kaj spirita — la sferoj de kulturo kaj civilizo — kaj ne pri la sferoj de ekonomio aŭ de politiko. En tiuj lastaj kampoj geografiistoj trovas abundon da eksportaj statistikoj, kaj historiistoj povas fari ne malpli abundan statistikon pri revolucioj . . .

Ĉion ricevis Ameriko el Eŭropo: nomon, la ĉefparton de siaj loĝantoj, sian ĉefreligion, literaturon, arton, filozofion. Dum la kvar jarcentoj pasintaj post la eltrovo, Eŭropo eksportis ĉion: homojn, librojn, malkovrojn, idealojn, teoriojn, sistemojn. Sed tiu eksportado ne malriĉigis Eŭropon. Nu, kiom ĝi riĉigis Amerikon? Dum tiuj kvar jarcentoj Ameriko faris ĉiujn klopodojn por eŭropiĝi, por kulture samrangiĝi al la eksportlandoj. Tiel Ameriko konstruis preĝejojn, lernejojn; kreis bibliotekojn, universitatojn; faris poezion, romanojn; donis traktaĵojn kaj formularojn por ĉiuj sciencoj; ĝiaj ĉefurboj penis iĝi fokuso de meza kaj supera kulturo. Sed kiomgrade Ameriko fruktigis la talentojn, kiujn provizis al ĝi malnova patrino Eŭropo? Ĉu Ameriko kompensis, eĉ parte, la trezorojn, kiujn pruntis al ĝi la latina civilizo? Kion donis Ameriko al la tutmonda kulturo?

En religio ni trovas nek grandan teologon, nek faman mistikulon, nek eĉ herezan movadon, ĉar ja eĉ herezaĵaj movadoj atestas intensan religian vivon.

En filozofio Ameriko konis kaj adaptis sistemojn naskitajn en Eŭropo kaj eĉ restis fidela pli longe ol Eŭropo al la naŭva pozitivismo de Comte. Sed Ameriko ne havas originalajn filo-

zofojn nek proprajn sistemojn. Serĉu ĉe en la plej ampleksa kaj detala historio de la filozofio kaj vi ne trovos ĉe unu amerikanon.

En literaturo la aferoj statas iom pli bone. Sarmiento, Rubén Darío, Rodó, Larreta, José Rivera estas nomoj konataj ekster Ameriko; sed neniu el ili iĝis vere popola, kaj neniu senteble influis eŭropan literaturon. Maria de Isaacs ne estis tiel populara kiel Graziella de Lamartine; la arto kaj personeco de Silva restis nekonata al la Eŭropo, kiun pasiigis Wilde; La Vorágine de Rivera neniel paligis la romanojn de Kipling. — En hispana filologio estas notindaj Bello kaj Cuervo, sed neniu ĉe songis paraleligi ilin ekzemple al la hispano Menéndez Pidal. — En la historio de la eŭropa teatro estas eminenta nomo, Pedro Ruiz de Alarcón, de verkisto naskiĝinta en Meksiko; sed tie li naskiĝis okaze, de hispanaj gepatroj, kaj juna venis al Hispanujo, kie li vivis kaj verkis. Same okazas al la itala artisto Ugo Bernasconi, naskiĝinta en Buenos Aires.

En arto la negocoj iras ĉe pli malbone. Lerlo pri faro kaj asimilo troviĝas en multaj lokoj, sed neniu artisto, kiu montras kreaĵon vere propran, sendependan de eŭropaj skoloj. La meksikano Diego Ribera paroligis eŭropajn kritikistojn, sed sen la famo kaj influo ekzemple de iu Pablo Picasso.

En scienco ne montriĝas plia boniĝo. Newton, Darwin, Lombroso, Einstein estas konataj kaj studataj en Ameriko same kiel en ĉiuj mondpartoj. En Ameriko ili trovis bonajn disĉiplojn kaj disvastigantojn de siaj eltrovoj. Sed ne ekzistas malkovro, nova teorio veninta el Ameriko; neniu fama scienculo vekis nian atenton aŭ ĉe nian scivolemon.

Ĉu necesas daŭrigi tiom melankolian kaj disrevigan recenzon? Al kiu eŭropa lando povas samrangigi Ameriko? Jen Ameriko estas ankoraŭ ŝuldanto al Eŭropo, ĉefe al ties mediteranea civilizo. Kaj ne temas pri subpremo fare de la hispana regado; ĉe en la jarcento de la libero, ĉe en la XXa jarcento, ni ne trovas ion kompareblan al la XIXa kaj XXa jarcentoj eŭropaj, de Rusujo ĝis Hispanujo.

Kio kaŭzas la mankon de amerikaj figuroj unuarangaj en la kadro de la moderna civilizo? Ĉu eble ignoro de eŭropanoj

al amerikaj valoroj? Nu ja, kiam oni pripensas la avidon de eŭropaj studemuloj kaj tradukistoj, precipe dum la lastaj cent jaroj, ŝajnas malfacile kulpigi eŭropan mankon de sciemo. Almenaŭ unu amerikan grandgeniulon ĉiuj eŭropanoj jam estus konintoj!

Ĉu tiun mankon kaŭzas maldensigo kaj malmulto de amerika loĝantaro? Sed ja en Eŭropo troviĝas tre malgrandaj landoj, kiuj donis sian kontribuon al la universala gloro. Jen ekzemple Nederlando, kies famon portas Erasmus, Vondel, Rembrandt, Huygens. Kaj simile ekzemplus Suomio, Ĉeĥujo, Katalunujo, se ni ne volas alĉiti antikvan Atikon.

Ĉu eble pro malrapido en formado de propra nova raso? Aŭtoĥtonaj popoloj de antaŭkolumba Ameriko havis sian civilizon, ĉefe artan, kaj la iberiaj konkerintoj venis de tiam floranta civilizo. Dum la XIXa jarcento jam parte finfandiĝis la variaj elementoj tie loĝantaj, tiel ke oni povus atendi ielan ekiron de aŭtonoma kulturo. Sed tiu kulturo, se fakte ĝi ekzistas, ĝis nun donis nenion el tiuj penso- aŭ artokreaĵoj, kiuj proprarajte kunriĉigas la intelektan havon de la homaro.

Povus ŝajni al iuj, ke manko de komunikiloj malhelpis kulturenan floradon. Jes ja, temas pri vastegaj landoj, parte ankoraŭ ne konataj de eŭropanoj, kio malfaciligas cirkuladon de ideoj kaj de alta spirita tensio. Tamen, malgraŭ ke maraj, teraj kaj aeraj komunikiloj multiĝis dum la lastaj kvindek jaroj, ankoraŭ ne videbliĝas rezultoj. — Sed cetere genio, kiam ĝi vere potencas, disfloras ĉe en solo, kiel eminente montris antikva Judujo.

Nu, kio kaŭzadis tion? Eble respondo latentas en la motaj vortoj de s-ano Sekelj. Spirita energio de popoloj estas relative fiksa kvanto. Se oni ĝin uzas en iuj sferoj, ĝi ne povas manifestiĝi en aliaj. Latinameriko, ĝis nun, elspezis plej grandan parton de sia intelekta kapitalo je profitigo de sia tero kaj por politika luktado. Tial malmulta forto restis por superaj aktivecoj de spirita, intelekta, idealaj aktivecoj.

Ŝajne ne ĉiuj kaŭzoj supre cititaj emas daŭri. Videbliĝas signoj, ke iuj malfortiĝas. Ĉar mi ne estas fatalisto, mi kredas,

ke malgraŭ ĉio restas okazo por optimismo, por atendi la miraklon.

Ĉi tiu artikolo ne volas esti malsata riproĉo. Ĝi pretendas nur venigi al la esperantista areno, per konstato de faktoj — eĉ se severaj, eĉ se doloraj, eĉ se foje preme disrevigaj — iom de tiu reŝia vibro, kiu skuis Amerikon de Rio Grande ĝis terkapo Horn, kiam Papini eldiris la ŝire malgajan rezulton de sia esplorado. Nenio monda estas fremda al ni, esperantistoj, pledantoj por universala kulturo. Min instigis ne io alia ol deziro malfermi Esperantujon al korfrata dialogo kun latin-amerikaj samideanoj.

J. Régulo Pérez  
Kanariaj Insuloj

## Literaturo

Cezaro Rosetti: KREDU MIN, SINJORINO!  
260 p., 13,5×19,5 cm. Bind.  
Prezo 5,40 gld. aŭ 1,65 dol.  
Eldonis: Heroldo de Esperanto.

Cezaro Rosetti, frato de Reto Rosetti, mortis en majo 1950. Legante lian postlasitan libron ni ĝojas, ke li skribis ĝin, bedaŭras, ke ĝi estas sola, bedaŭras, ke li ne restis inter ni almenaŭ tiel longe, ke ni povis diri al li, kiel ni ŝatas ĝin.

Li rakontas memorojn el sia vivo kiel foira vendisto en Anglujo kaj Skotlando. Lia rakontokapablo estas neordinara. Li neniam donas iun eventon aŭ iun detalon tro multe nek tro malmulte, ĉio estas konciza kaj tamen plenviva kiel la vivo mem. Humoron li havas. De la unua linio ĝis la lasta ni kvazaŭ konkrete travivas kune kun li tiujn jarojn de lia vivo. Tre multe da homoj ni renkontas, kaj ni bezonas nur kune kun li iomete kunesti kun ili por konatiĝi kun ili kvazaŭ de interne.

Lia lingvo estas certe la plej viva kaj plej matura, kiu ĝis nun troviĝas en iu esperanta libro. Ĝi ne estas beletré arta aŭ artistata, sed li scias, kiel oni konstruas bonan frazon, sin-

takse kaj esprimvalore, kaj tio estas finfine la plej granda arto en lingva esprimo. La bontrovilaj proverboj kaj parolturnoj uzitaj kiel ĉapitrorubrikoj siamaniere montras, ke nia lingva heredaĵo estis por li viva realaĵo.

Evidente li ŝatis sian metion, alie li apenaŭ povus skribi pri ĝi, kiel li faris. Tamen oni demandas sin, ĉu tia aktiveco povis efektive kontentigi homon kun la spiritaĵoj de Cezaro Rosetti. Tagon post tago kaj jaron post jaro persvadi homojn aĉeti varojn, kiujn ili ĝenerale ne bezonas aŭ povas pli facile kaj malkare havigi al si en plej proksima butikoj, se la vardistribuo estas racia kaj laŭcela — ĉu tio estas vivotasko por vera homo? Pri tio la aŭtoro ne diras eĉ unu vorton. Mi tute ne konis Cezaron Rosetti. Ke li ne estis supraĵa, pri tio atestas lia libro. Sed mi havas la senton kaj emas kredi, ke en li troviĝis granda kaj profunda personeco, kiu sciis profunde observi, ekzameni kaj prijuĝi la vivon kaj ankaŭ posedis fortajn kaj profundajn sentojn. Sed li restas ĉiam malantaŭ netravidebla kurteno, li nur sendas la foirvendiston Rosetti por akompani nin por konatiĝi kun la granda foira vivo, plena de bruo, penado, aspiroj, blufoj, vivo en si mem tute sensenca kaj nevera, sed en kio troviĝas io vera kaj sencohava aŭ almenaŭ sencopostula, la homoj.

S. E.

Paul Bennemann: MIRU, PENSU, RIDU!  
240 p., 15×21 cm. Bind.  
Prezo 5,40 gld. aŭ 1,65 dol.  
Eld. Heroldo de Esperanto.

Tiu ĉi libro enhavas tiajn kuriozaĵojn kaj ĉiusecajn informojn, kiajn oni trovas en certaj popularaj gazetoj: Kuriozaĵoj el la notlibroj de mondhistorio, Tra landoj kaj maroj kaj al la steloj, Mirakloj de nia korpo, El la sferoj de la naturo kaj tekniko, Pri lingvoj kaj libroj, Kaprompiloj, Ludoj kaj amuzaj, Solvoj de la problemoj kaj enigmoj, Diversaĵoj, Tutmonda anekdotaro, La mondo ridas.

La esperantistoj, precipe ĉiuj kiuj instruas, ne forgesu la libron. Ĝi estas neelĉerpebla fonto por agrabligi kaj faciligi instruadon kaj konversacion de la komenca ŝtupo ĝis tiu de



lingvospertaj societanoj. Pro la intereso kaj mallongeco de la informoj — kaj la bona stilo de Bennemann — ĝi ŝajnas ideala legaĵo por memstara legado de lernantoj.

S. E.

José Enrique Rodó: Ariel.  
Trad. Manuel Fernández Menéndez.  
Eld. Urugvaja Esperanto-Societo,  
Yaguaron 1397, Montevideo, Uruguay.  
Prezo 1 dol. aŭ 6 ŝilingoj; rab. 30 %  
Je mendo de minimume 10 ekz.

Verŝajne neniu alia lando ĝis nun donis kiel sian unuan kontribuon al la esperanta literaturo tiel altnivelan kulturlibron el ĵus pasinta tempo.

Rodo (1871—1917) laŭ la biografia noto en la libro ŝajne estis unu el la plej eminentaj, eble la plej eminenta, el la urugvajaj humanistoj kaj idealistoj de sia tempo.

La nomo de la libro sugestas pri la enhavo, spiriteco kaj nobleco kontraŭ materialismo kaj vulgareco. Ĝi estas donita en formo de prelegoj al imagata aŭdantaro; eble oni povas pli bone diri, ke estas instruaj meditoj. Tiu demando estas la plej aktuala kaj grava de nia tempo. Por la nuna lukto inter detruaj kaj konstruaj fortoj en la kultura vivo la verko de Rodó tamen verŝajne malmulte signifas. Ĝi antaŭ ĉio impresas kiel idealisma elokvento, en la plej bona senco de la esprimo. Li prezentas al ni la esencon de la klasikaj kaj eŭropa kulturoj, citante tre multe da nomoj kaj pensoj. Proprajn originajn pensojn li apenaŭ donas. Diri tiel ne signifas malgrandigi lian valoron, nur determini lian specon. La grandaj popolklerigantoj ĝenerale estas kompilistoj en bona senco, kaj por la kulturo en nuntempa demokratio ili estas personoj de granda signifo. Sed pro tio, ke lia idealismo estas tiom ligita al erudicio, ĝi estas, se mi povas tiel diri, tre intelekta, eĉ abstrakta, malproksima de la aktuala kaj origina vivo.

La lingvo de la traduko estas bela, kaj ne estas tro multe nomi ĝin artaĵo. Sed la frazoj estas tie kaj tie tre hispankarakteraj t. e. la frazkonstruo el propozicioj, cetere oni ne rimarkas hispanismojn. Eble la tradukinto intence skribis tiel

por konservi la majstran stilon de la originalo. Sed tiel oni nek konservas nek redonas la majstrecon de stilo. Oni devas redoni ĝin per samnivela esperanta frazkonstruo. Tia transkonstruado estas en tiu ĉi kazo efektive tre malfacila pro la ĉizita formo de la originalaj frazoj kaj ilia riĉa enhavo. Tiu hispana karaktero tamen faras la legadon pli peza por tiuj, kiuj ne estas hispanlingvaj, kaj tial la origina majstra stilo ne plene efikas tie, kiel ĝi devus. Ne belstila estas ofta apostrofado de la artikolo.

Se vi povas legi librojn de tiu ĉi speco, mi rekomendas ĝin al vi. Se vi havas tempon kaj internan trankvilon por legi ĝin en la maniero, en kiu oni devas legi tiajn librojn, ĝi povas doni al vi multe da spirita nutraĵo.

S. E.

Louis Bastien: Naŭlingva etimologia leksikono.  
Paĝoj xvii + 317; fortika tola bindo.  
Prezo 12 ŝ. 6 p.  
Eld. The Esperanto Publishing Co.

Jen dua eldono de libro, kiu aperis antaŭ 40 jaroj. La leksikono montras la internaciecon de la esperantaj vortoj, donante la respondajn vortformojn en latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla, rusa. La esperanta vortprovizo konsiderinde pligrandigis dum tiaj 40 jaroj. Tial la nova vortlisto estas konsiderinde pli ampleksa kaj enhavas multajn korektojn kaj aldonojn.

Jarlibro de UEA 1951. Unua parto.  
Neaĉetebla, ricevebla nur de individuaj membroj de UEA.

La jarlibro de UEA de jaro al jaro fariĝas pli riĉenhava kaj por aktivaj esperantistoj pli kaj pli necesa konsultlibro. La frua apero en tiu ĉi jaro estas aprobinda, kaj ni dankas la pretigantojn de la libro. Pri la riĉa enhavo atestas elokvente la enhavotabelo, kiu en malgrandaj literoj ampleksas tutan paĝon. Novaj atentindaj rubrikoj estas: Aranĝoj esperantistaj en 1951, Internacia Somera Universitato — regularo, Gazetara servo, Koresponda servo internacia.

Komandanto Peter Clissold; Mariata terminaro.  
Prezo 1 ŝ. 6 p., afr. 1 p. — aŭ 5 rpk afrankite.  
Eld. UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.)  
Anglujo.

Tiu ĉi fakterminaro de UEA, la 10a en la serio, estas reprezento de la du partoj, kiuj unue aperis en la duaj partoj de la jarlibroj de 1949 kaj 1950. Ĝi havas 62 paĝojn kaj klarigajn ilustraĵojn. Celere vidu iamajn rec. pri tiuj jarlibraj partoj.

## Refuto

Sur paĝo 9 de nro 1/1951 de MR W. Auld diras: "S-ro Stuttard, ekzemple, sugestias, ke ne eblas reprodukti dialektojn en Esperanto." Ke tio estas simpla malvero pruvu la koncerna citaĵo (mia recenzo pri Leteroj de mia muelejo): "La diversaj provoj traduki variaĵojn de nacia lingvo ĝis nun tute ne estas kontentigaj. Kripligo de Esperanto ne estas solvo pro la baza fakto, ke Esperanto ne jam estas familia lingvo kun ties delikataj nuancoj de esprimo, kaj la sekvo de kripligo estas evidente artefarita ĵargono — pidĝino — kiu elvokas nur malbelan, ĝenan kaj neniel taŭgan impreson."

La du vortoj "ne jam" por kiu ajn logikisto implicas la fakton, ke la eblo ekzistas, kaj tio refutas la aserton de W. A. Celere, li mem poste diras, ke ekzemploj de iuj konataj aŭtoroj pruvis nur "ke almenaŭ certagrade tio estas ebla". Tiu "certagrade" sugestias mankojn kaj nur ripetas kion mi mem pli forte esprimis.

Por la leganto, kiu eble kredas, ke la poste citita frazo en la sama paragrafo: "nia lingvo ne kapablas tion", estas dirita de mi, mi volas diri, ke tiu esprimo ne apartenas al mi.

Mason Stuttard.

*Korsktoj.* En nro 6/1950, p. 15, lasta linio, afable anstataŭigu "ne" per "ke" — p. 17, lin. 21, "sukero" per "sukceno".

## Al la legantoj de MR

Mi ĵus eksciis, ke la preskostoj ankoraŭ pli altiĝis. Por MR tio signifas aldonon de 100 kr. al la pli frue menciita kosto por ĉiu numero. Sesnumera jarkolekto ne plu estas ebla. Multaj skribis al mi, ke MR, se iel eble, devas pluvivi. La sola maniero por daŭrigi la eldonadon estas eldoni en 1951 nur 4 numerojn sed kun la abonprezo de 6 kr. Krome estas bezonataj pli ol 200 abonantoj. Ĉis nun estas anoncigitaj ĉ. 360, sed 600 estas bezonataj por kovri la elspezojn.

Tiu abonprezo estus alta, precipe se ni konsideras nur la paperkvanton. Sed MR provis esti kaj espereble estas ne nur presita papero.

Mi faris, kion mi povis. Nun la sorto de MR dependas pli de la legantoj ol de mi. Se vi trovas kvarnumeran jarkolekton por 6 kronoj tro kosta kaj tro nekcontentiga, la rektaj abonantoj afable tuĵ anoncu tion al mi, kaj mi repagos la monon, kiu restas de iliaj abonoj. La aliaj abonantoj aŭ aĉetantoj same turnu sin al siaj libroservoj aŭ aliaj perantoj; tiuj informu min.

Sed se ne venos tiaj informoj, aŭ nur tre malmultaj, mi konsideros tion akcepto de mia propono kaj laŭpove daŭrigos la eldonadon. Sed tiukaze ne forgesu, kiom da abonantoj ni ankoraŭ bezonas! Faru vian plej bonan por akiri ilin! Se venos tiom da abonantoj, ke estos eble fari iun numeron pli ampleksa, mi kompreneble faros tion.

Stellan Engholm